

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sokr.: S-ro R. DESRINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 54 49150 BAUGE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

===== la n°: 4 F. Abono: 15 F. Kotizo: 5 F. Sume: 20 F. =====

+++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la
10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N° 131 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por mi. ***

===== DECEMBRO 1981 =====

+++++

BILETO DE LA PREZIDANTO

Encarté dans le dernier numéro de notre bulletin, un feuillet intitulé "Premier rendez-vous vous a offert, comme d' autres publications espérantistes l' ont fait pour leurs lecteurs, un moyen de participer à l' effort de diffusion de la Langue Internationale.

Par la création de cette méthode simple, l' Union Française pour l' Esperanto vous invite à prendre part à la campagne d' information et d' éveil de l' intérêt qu' elle a inscrite, lors de son dernier congrès, en tête de ses résolutions pour 1982.

L' efficacité de la langue sera proportionnelle à sa diffusion. Grâce à UFE en particulier, divers moyens, méthodes, cours, rencontres, stages, sont proposés à qui veut accéder à la connaissance, à la pratique et au perfectionnement. C' est pourquoi notre association appelle ses membres à soutenir et à utiliser cette action, et à se sentir solidaires de tout ce qui est entrepris par tous les groupements en ce sens.

De même, l' action entreprise auprès des autorités et des parlementaires pour qu' un projet de loi soit soumis au vote des assemblées, donnant officiellement à la Langue Internationale le caractère d' une matière d' enseignement, appelle notre soutien. Il semble que la conjoncture présente soit plutôt favorable. Il importe cependant que la démonstration par la pratique courante apporte un appui concret aux démarches faites en ce sens.

En concourant ainsi à tout ce qui se fait en général dans le mouvement, nous ne perdrons pas de vue les objectifs propres à notre action dans les milieux chrétiens. Ceux-ci ne seront sensibilisés que dans la mesure où il sera reconnu qu' un vaste échange par-dessus les frontières favorise une véritable communion par des contacts d' homme à homme, de famille à famille, de paroisse à paroisse, et qu' il favorise aussi le rapprochement des diverses confessions à la recherche des voies vers l' Unité.

./...

L' Esperanto n' a trové jusqu' ici, auprès des moyens de communication vers le grand public, que des portes à peine entrouvertes. Peut-être avons-nous trop tendance à vivre en circuit fermé. Et sans doute, les officiels comme le public acceptent avec une étonnante résignation que la multiplicité des langues soit un obstacle à la communication directe, sans le recours aux interprètes ou aux systèmes de traduction simultanée.

L' Eglise, elle aussi, mis à part le latin, ou le grec sous d' autres cieux, utilise dans ses échanges l' une ou l' autre, ou plusieurs des langues nationales, étrangères pour la plupart des participants. Radio-Vatican offre un exemple de la répétition des mêmes informations à longueur de journée, dans un nombre impressionnant de langues diverses.

Le récent message des évêques de France nous invite à être, dans les multiples courants où nous entraîne l' époque où nous vivons, solidaires de tout ce qui mène à la réalisation plus complète de l' homme et de la femme, à la juste utilisation à cette fin des progrès scientifiques, au partage des biens pour la paix dans une recherche sincère de la justice. Que tous les hommes soient pour nous, sans distinction, ceux qui sont avec nous appelés au salut annoncé au monde par Jésus-Christ.

Nous savons que la Langue Universelle, par les contacts qu' elle rend possibles, nous ouvre le chemin, dans les perspectives qui sont nôtres, vers une culture universaliste qui est éclairée par la recherche du Règne de Dieu dans une immense fraternité humaine.

R. Cl. COLAS

~~~~~  
BIBLIA NOMARO (daŭrigo)                      AŬIJA (1 Reĝ' 11, 29)

"En mia popolo da triboj prenu dek  
De reĝ' Salomono, krom unu pro Davido,  
Kiun mi elektis por longe daŭra sido  
Sur trono, lojala sen ajna vera pek'".

Tiele parolis en sia vorta ek'  
Profeto Aŭija firme al nebacid':  
"En mia popolo da triboj prenu dek  
De reĝ' Salomono, krom unu pro Davido..."

"Sur dia admono elstaras nigra strek'  
Koncerne fidelon al Dio kaj sen brido  
Adoras Aŝtaran kun kruta kordecido  
Stumpantaj servantoj en aĉa terolek'".

En mia popolo da triboj prenu dek".                      27/2/78.

~~~~~  
KRISTNASKA GOJO
=====

- Ĝojegu, justuloj, jen la naskiĝo de la Justiganto.
- Ĝojegu, malsanuloj kaj kripluloj, jen la naskiĝo de la Savanto.
- Ĝojegu, kaptitoj, jen la naskiĝo de la Elaĉetinto.
- Ĝojegu, sklavoj, jen la naskiĝo de la Mastro.
- Ĝojegu, liberaj homoj, jen la naskiĝo de la Liberiganto.
- Ĝojegu, ĉiuj kristanoj, jen la naskiĝo de Jesuo-Kristo.

S-ta Aŭgusteno (trad. A. B.)

~~~~~  
NIA MEMBRARO

Novaj dumvivaj membroj: 48) S-to EICKORN (Germ.); 49) S-ino BLANCKAERT (M & M); 50) S-ro LECOCQ (I & L).

Al ili specialan dankon, ĉar per sia malavara subteno, ili grave helpas FKEA.

Membroj bonfarantoj 1982: 1) S-ro BESSIERE (S-M)...

Ankaŭ tiu membrokategorio ege utilas al la pli bona funkciado de niaj diversaj servoj. S-ro Bessière havu ĉijare multajn imitantojn kaj akceptu nian koran dankon pro la bona ekzemplo, kiun li donas!

\*

\* \* \*

PROKOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO DE LA 20-a DE SEPTEMBRO 1981

Ĉeestas: P. Bourdon kaj Degrelle, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-inoj Preux kaj Vanneau, S-roj Bessière, Colas kaj Villeneuve.

Petis senkulpiĝon: S-roj Despiney kaj Véron.

La kunveno komenciĝas je la 14.30 per la kanto: "Patro, donu la pacon.." kaj preĝo por S-ino Despiney, ĵus forpasinta, edzino de nia ĝenerala sekretario.

Ni aprobas la tagordon kaj la raporton de la lastaj kunsidoj.

Kongreso en Grésillon: bona kaj frata etoso, en agrabla kongresejo. Iu proponas, ke, estonte, oni havu pli da tempo por kanti.

Ekumena kongreso KELI-İKUE en Nederlando: 154 gekongresanoj el 17 landoj. Protestantoj dufoje pli multnombraj ol katolikoj. Bonega etoso, interŝanĝoj tre frataj. Ĉiutage okazis katolika diservo. Tempo mankis por diskuti pri la diferencoj inter la diversaj eklezioj. Liturgia komisiono laboras por havi bonan meslibron, kaj por ke la traduko de la kredsimbolo estu la sama por ĉiuj, kiel estas "Patro Nia". Sed sur la ekumena kampo, oni ne progresis. Ne okazis vera ekumena diservo.

Kongreso FKEA 1982: Ĝi okazos je Pasko en Nancy (10-12/4/82). Tri partoj en la programo: 1) spiritaj ekzercoj (paska vigilio); 2) ĝenerala kunveno; 3) turismo (vizito de Nancy kaj ĉirkaŭaĵo, distraj vesperoj).

Kongreso IKUE 1982: Ĝi okazus en Lille de la 17-a ĝis la 23-a de julio. Proponita temo: la kristana Paco (fundamento: paco kaj malarmado; paco kaj senperforto)

S-ino Koopmans, nederlanda pastoro, faros homelion dum la dimanĉa diservo.

Liturgio: P. Degrelle kaj Eichkorn. Vizito de Lille; ekskurso al la flandraj montoj.

Bulteno: Pluraj alilandanoj (polino, japano, brazilano) ŝatas ĝin.

Financoj: ekde la 1-a de januaro, la kotizoj plialtiĝos: ordinara: 20 F; bonfara: 100 F; dumviva: 400 F.

Diversaĵoj: la materialo por la bulteno devas atingi S-inon Vincent nepre antaŭ la 10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

Venonta komitatkunsido: 13-an de decembro.

La kunsido finiĝas je la 17-a horo per la kanto: "Marŝas ni al l' unuec'.."

Protokolis: G. Preux.

ROZARIO (daŭrigo)

DOKSOLOGIO: Ĉiesan Patron gloru pro Lia granda faro:  
Li kreis l' Universon, kie vivon ni ĝuas  
Ne nur por la nuntempo, ĉar Lia vort' instruas,  
Ke daŭrados senfine Lia kreo girlanda.

Ĉiesan Fratona gloru per fido gracofranda:  
De Lia kor' aperta la savig-amo fluas.  
Spiriton sanktan gloru, kiu ĉion influas  
Estante en ni ĉiuj Krist-veron propaganda.

Ja, gloru per via kor' kaj gloru per via kant',  
Gloru per fratec-agad', gloru per ĝoja konstant',  
Gloru ĝis spiro fina laŭ la Habel-modelo.

Gloru en via solec', gloru kun la najbaro,  
Gloru per via esper', gloru per kreddeklaro.  
Gloru la Triunuon nun kaj en la ĉielo.

R. Degrelle (25/12/1980)

\* \* \* \*

KELKAJ TANKAĴJ, de la sama.

|                      |                        |                      |
|----------------------|------------------------|----------------------|
| Dumtage suno         | Ekflugas birdoj        | Kaj bestoj multaj    |
| Varmigas sola brile. | Al ĉiuj teranguloj     | Ekvivis sur la tero  |
| Dumnokte stelojn     | Plumarariĉe.           | Kaj bleke ridis      |
| Apudas pala luno     | Eknaĝas fiŝaj birdoj   | Sublume tre tumultaj |
| Tamen ne tre humile. | Lerte kun vivpostuloj. | Pro patra ditenero.  |
| Kaj siabilde         | Kreint' disdonis       | Jen l' historio      |
| Li kreis gevirforme  | La amon kaj la forton  | De krea dialogo      |
| La homan paron       | Por daŭre vivi.        | Far nia Dio.         |
| Ĝin prenis amoŝilde  | Sed nuran homon kronis | Al Li la danko krio  |
| Eterne patranorme.   | Donante parolvorton.   | Sen ia epilogo.      |

RADIO ROMA ESPERANTO

LA KARDINALO, KIU VIDIS OK PAPOJN

Teksto de Giulio Toth, trad. de Antonio De Salvo

Antaŭ kelkaj monatoj, finiĝis la restaŭraj laboroj de la plej alta sonorilturo en Romo, tiu de la baziliko "S-ta Maria la Granda". Okaze de la inaŭguro, akceptis la ĵurnalistojn ĉe la supro de la turo Kardinalo Carlo Confalonieri, kiu, 88-jara, piede supreniris 75 metrojn.

Kard. Confalonieri estas la Dojeno de la Kardinala Kolegio, sed dum intervidiĝo li precizigis, ke la "dojeno" ne necese estas "la plej aĝa" el la kardinaloj; fakte, la Papo nomas lin laŭ propono de la ses kardinaloj de la ses antaŭurbaj diocezoj, nome de la plej antikvaj episkopejoj ĉirkaŭ Romo.

Naskiĝinte en Seveso la 25-an de julio 1893, C. Confalonieri devis interrompi siajn studojn en la seminario pro la unua mondmilito; dum pluraj monatoj li travivis la dramon de la vivo en la fronta zono. Iĝinte sacerdoto, li oficis en la vilaĝo Barlassina. En februaro 1922, li akompanis al Romo, por la Konklavo, la Ĉefepiskopon de Milano, Kard. Ratti, kiu iĝis Papo Pio XI-a; Kard. Confalonieri iĝis lia sekretario, kaj restis ĉe li dum lia pli ol 17-jara papeco.

Poste, li iĝis Ĉefepiskopo de la itala urbo L' Aquila, kaj Prefekto de la Kongregacio pri Episkopoj. Papo Johano XXIII-a igis lin Kardinalo en 1958. Li partoprenis en la Konklavo, kiu elektis Paŭlon VI-an, sed li ne povis - pro sia aĝo - partopreni en la du Konklavoj de 1978, tiuj de Papo Luciani kaj de Papo Wojtyła.

Kard. Confalonieri vivas en Romo, en loĝejo, kiu alrigardas la Placon "S-ta Petro". Li havas tre viglan agadon kiel studulo kaj verkisto. Li havas karakteron malferman kaj elverŝeman, kaj li kutimas diri: "Mi ŝatas vivi en la nuntempo, kaj pro tio mi estas longviva".

HEBREOJ EN ROMO Teksto de Artissi, trad. de A. De Salvo

De 5 jaroj agadas en Romo la Centro "Ekumena Rusio", kiu helpas la migrantojn (plejparte hebreojn) el Sovetunio. La Centro estis fondita de du katolikaj sacerdotoj, pastroj Nilo kaj Sergio. Ĝi aperigas gazeton, "La voĉo de Rusoj en Romo", kiu montriĝis utila informilo por la migrantoj, kiuj spertas malfacilaĵojn por enkonduki sin en la italan medion.

Al Romo alvenas, ĉiujare, proksimume 3 500 hebreoj, el kiuj, tamen, multaj ne restas en Italio, sed plumigras al aliaj landoj. Ĉi tiuj homoj havas problemojn koncerne loĝadon, kuracadon, kulturon. La Centro "Ekumena Rusio" intervenas ankaŭ por helpi la migrantojn veturi al aliaj landoj. Ankaŭ multaj epizodoj de la soveta disidenta movado trovis eĥon en la programoj de la Centro, kiu vivas nur dank' al privataj donacoj kaj al la subvencioj de karitataj instancoj.

ESPERANTISTA KONGRESO Teksto de X, trad. De Salvo

Disvolviĝis en Romo (19-24/9/81) la 52-a Kongreso de la Itala Esperanto-Federacio, sub la alta patroneco de la Interparlamentara Grupo "Amikoj de Esperanto", al kiu aliĝas 50 deputitoj kaj 45 senatanoj el ĉiuj politikaj partioj.

Partoprenis en la Kongreso pli ol 300 reprezentantoj de la italaj Esperanto-grupoj, kaj observantoj flanke de pluraj eksterlandaj Esperanto-asocioj. La kongresa temo, "Esperanto kaj Eŭropo", montriĝis plene aktuala, des pli en konsidero de la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj ekzistas en la sino de la Eŭropaj Komunajtoj.

STATUA JUBILEU Teksto de Manzi, trad. De Salvo

La italaj kaj brazilaj telespektantoj povis vidi, lundon 12/10/81, neordinaran spektaklon: dank' al du rektaj televidaj kunligoj per satelito, la italoj vidis la eklumiĝon de la kolosa statuo de "Kristo Elaĉetanto" en Rio de Janeiro, dum tiuj brazilaj vidis Papon Johanon Paŭlon II-an, kiu, premante butonon el Castelgandolfo, per radiaj impulsoj eklumigis la statuon.

La aranĝo, kiu ripetas tiun de Guglielmo Marconi en 1931, okazis omaĝe al la 50-a datreveno de la statuo, simbolo de la brazila religia spirito.

%%%%%%%%%

URGA ALVOKO

- Kiu leganto konas la novajn adresojn de: 1) F-ino Armande STAS  
2) S-ro L.H.BRANS (Nedrelando)  
3) M. le Curé de l' église St-Ferdinand à Libourne?


Bonvolu eventuale sendi ilin al la redaktorino, kiu dankas vin.

# KOMPATU, SINJORO H383


Teksto kaj muziko : L. Deiss / tradukis : R. Degrelle



Rekantaĵo : Kom - pa - tu , Sin - jo - ro , Kom - pa - tu nin.



1. Sin-jor! Je-su-Kristo, pre-ĝan-ta sur la oliv-ar-ba mon-to, Ploranta



pro mal-ĝojo kaj te-ruro, Konsole kuraĝi-gata de An-ĝelo

S.E.F.I.M. 611.10.76

# VI ESTAS NIA ESPERO H142

Kolektiva verko : tradukis : R. Degrelle



Rekantaĵo : Vi es-tas ni-a es-pe-ro, Sin-jo-ro, ni-a sa-vo.



1. Ho kru-co sta-ra sur mon-do Ho kru-co de Je-su' Krist' Vi



ŝpru-cas vi-vom sav-fon-to, Ho kru-co de Je-su-Krist'

S.E.F.I.M. 611.10.76

2. Sinjor' Jesu-Kristo,  
 Porfidata per la judasa kiso,  
 Forlasata de viaj Apostoloj,  
 Transdonata en la manojn de l'pekuloj.
3. Sinjor' Jesu-Kristo,  
 Vangoŝrapata, kovrata de kraĉoj,  
 Vundata per batoj de l'soldatoj,  
 Kondamnata al surkruca morto.
4. Sinjor' Jesu-Kristo,  
 Skurĝata kaj per dornoj kronata,  
 Tegata per purpurpura mantelo,  
 Surŝutata de insultoj hontigaj.
5. Sinjor' Jesu-Kristo,  
 Ŝarĝata de via peza kruco,  
 Alsupranta ĝis la kalvario,  
 Portanta ĉiujn pekojn niajn.
6. Sinjor' Jesu-Kristo,  
 Senigata de viaj vestoj,  
 Sensoifigata per vinagro,  
 Krucumata inter du krimuloj.
7. Sinjor' Jesu-Kristo,  
 Pardonanta al viaj ekzekutistoj,  
 Konfidanta vian sanktan Patrinon  
 Al la disĉiplo amata.
8. Sinjor' Jesu-Kristo,  
 Transdonanta vian spiriton  
 Al la amo de via Patro,  
 Mortanta por ĉiuj pekuloj.

2. Ho kruco, trea frenezo,  
 Ho kruco de Jesu-Krist'!  
 La amo estas frenezo,  
 Ho kruco de Jesu-Krist'!
3. Ho kruco, saĝo plej ega,  
 Ho kruco de Jesu-Krist'!  
 Soleco estas plej ega,  
 Ho kruco de Jesu-Krist'!
4. Ho kruco, venko unika,  
 Ho kruco de Jesu-Krist'!  
 Ho kruco daŭre efika,  
 Ho kruco de Jesu-Krist'!

ABONOJ je ESPERO KATOLIKA por 1982: 1) COLLEU Marcel; 2) TOURNAY Raymond; 3) RIBOT André; 4) TIERCE Roald; 5) SCHNEIDER Gérard; 6) SAUTREUIL Bernard; 7) LANCE gefratoj; 8) MAINVIS fratoj; 9) HARIVEL fratoj; 10) SIMONNET Thierry; 11) ROLLAND Romuald; 12) AMINOT Michel; 13) THIOLLIERE Eloi.

ALJENE DION: Jenas nia koro, jenas nia amo,  
Jenas nia volo, jenas nia kredo,  
Jenas nia preĝo sen ia ajn sedo,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por ĉiamo.

Jenas nia faro, jenas nia koro, Jenas nia ĝojo, jenas nia faro,  
Jenas nia buŝo, jenas nia paco, Jenas nia kapo, jenas nia jeso,  
Jenas nia brako sen ia ajn laco, Jenas nia mano sen ia ajn ĉeso,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por deĵoro. Jenas ili kunaj ĉiuj por 1' homaro.

Jenas nia vero, jenas nia ĝojo,  
Jenas nia forto, jenas nia plaĉo,  
Jenas nia vorto sen ia ajn klaĉo,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por daŭrvojo.

Jenas nia kerno, jenas nia vero, Jenas nia spiro, jenas nia kerno,  
Jenas nia psalmo, jenas nia ado, Jenas nia verko, jenas nia ĉarmo,  
Jenas nia serĉo sen ia ajn fado, jenas nia vido sen ia ajn larmo,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por espero. Jenas ili kunaj ĉiuj por eterne.

Jenas nia kanto, jenas nia spiro,  
Jenas nia klamo, jenas nia klaro,  
Jenas nia danco sen ia ajn knaro,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por lert-iro.

Jenas nia certo, jenas nia kanto, Jenas nia esto, jenas nia certo,  
Jenas nia ritmo, jenas nia festo, Jenas nia bono, jenas nia helo,  
Jenas nia dono sen ia ajn resto, Jenas nia eno sen ia ajn felo,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por ek-kvanto. Jenas ili kunaj ĉiuj por konverto.

Jenas nia vivo, jenas nia esto,  
Jenas nia kuro, jenas nia sano,  
Jenas nia preto sen ia ajn vano,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por am-gesto.

Jenas nia veno, jenas nia vivo, Jenas nia movo, jenas nia veno,  
Jenas nia penso, jenas nia daŭro, Jenas nia ardo, jenas nia fruo,  
Jenas nia staro sen ia ajn kaŭro, Jenas nia helpo sen ia ajn ĉuo,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por aktivo. Jenas ili kunaj ĉiuj por serv-pleno.

Jenas nia eto, jenas nia movo,  
Jenas nia scio, jenas nia ĉio,  
Jenas nia ago sen ia ajn fio,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por iv-kovo.

Jenas nia nio, jenas nia eto, Jenas nia voko, jenas nia nio,  
Jenas nia iĝo, jenas nia gento, Jenas nia mono, jenas nia domo,  
Jenas nia indo sen ia ajn endo, Jenas nia turo sen ia ajn kromo,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por pac-meto. Jenas ili kunaj ĉiuj por am-plio.

Jenas nia amo, jenas nia voko,  
Jenas nia tujo, jenas nia pluso,  
Jenas nia koro sen ia ajn ruzo,  
Jenas ili kunaj ĉiuj por kred-stoko.

R. DEGRELLE

SKRIBIS D-ro ZAMENHOF (12/6/1905):

"La grupo pariza estas sendube la plej grava el ĉiuj grupoj esperantistaj en la mondo. Mi ĉiam deziris, ke Parizo estu la ĉefa loko por nia tuta afero, kiu nepre bezonas havi ian konstantan centron. Parizo aŭ Bruselo estas miaj sopiroj, sed multaj gesamideanoj opinias aliel."

Komentas F. M. el Ĉeĥoslovakujo: "La t. n. "franca periodo" en la historio de la monda Esp<sup>o</sup>-movado estas sendube la plej grava, eĉ la plej famkonata".

Ĝis nun? N.D.L.R. Kaj nun???

LINGVA ANGULO

Cu la esprimoj proponitaj en la n<sup>o</sup> 130 aspektis netradukeblaj al niaj kurtimaj cerbumantoj? Nur 4 el ili: G-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), GUILLON (G) kaj MICHAU (M) sendis la jenajn tradukojn:

- 1) tomber de haut: fali de sia piedestalo, de sia alta ĉevalo, tute disreviĝi (B); esti ekstreme surprizita (D); konfuziĝi (G); abrupte seniluziiĝi, amare elreviĝi (M).
- 2) bon an, mal an: mezkvante, proksimume, pli malpli (B); meznombre laŭ jaroj, laŭ bonaj aŭ malbonaj jaroj (D); tiel bone kiel eble (G); mezrikolte, pli malpli profite (M).
- 3) une pierre d' achoppement: ŝtono de falpuŝiĝo, tubero en la afero, kontraŭaĵo, fiaskigilo (B); kaŭzo de malsukceso, neantaŭvidita malfacilaĵo (D); malhelpaĵo (G); ĝenaĵo, bremsilo (M).
- 4) à vau-l' eau: laŭ la fluo de l' akvo (B); senreziste, forlasite (D); je fiasko (G); tute senorde, sengvide, hazarde (M). (a)
- 5) il a accusé le coup: li senaplombiĝis, ŝanceliĝis (B); montri per sia reago la ŝokon ricevitan (D); tion li ~~kontraŭis~~ kontraŭis (G); li estas frapstampita, batskuita (M).
- 6) administrer une volée de bois vert: regali per vergado, severe admoni (B); forte bati (D); vigle kontraŭagi (G); disbati, vergadi (M).
- 7) aller au charbon: iri al la karbofronto, al la frontlinio, al la antaŭpostenoj (B); peni por informiĝi, por sukcesi (D); serĉi karbonon (G); decideme eklabori (M) (b).
- 8) s' attirer les foudres de quelqu' un: altiri al si ies koleron, vekti al si ies venĝemon (B); kolerigi iun, eksciti iun ĝis kolero (D); iun kolerigi kontraŭ si mem (G); instigi ies koleregon, furiozigi iun (M).
- 9) il veut tout avaler: li estas nebrideble ambicia, superambicia, lia ambicio estas nesatigebla (B); li estas tro avida, lia ambicio estas senlima (D); li estas avidega (G); li ĉion avidas, li volas ĉion engluti (M).
- 10) être au bas de l' échelle: okupi la plej malsupran ŝtupon en la hierarkio, esti plej malaltranga (B); havi la plej malaltan oficon (D); esti subalternulo (G); esti lastranga, lastŝtupe stari (M).

- (a) pli bone estus "al fiasko"
- (b) ne eblis al mi elekti la plej taŭgan tradukan, ĉar mi ne konas tiun esprimon kaj povis trovi ĝin en neniu el miaj (multaj) vortaroj, sekve mi ne kapablas ĝin kompreni. Cetere, la diverseco de la proponitaj tradukoj pravas kiel dubesenca ĝi estas... kaj ankoraŭ pli konfuzigas min...

Pro tio, mi proponas tiun finan klasifikon, kiu eble ne estas tute ĝusta nek justa: 1) S-ro BOURGOIS (21 p.); 2) S-ino MICHAU (20); 3) S-ro DAUCHEZ (19); 4) S-ro LE MARQUAND (18); 5) S-ro RIBOT (14); 6) en egaleco F-ino STANIENDA kaj S-ro GUILLON (10).

S-ro BOURGOIS gajnas premion en valoro de 50 F, S-ino MICHAU en valoro de 30 F kaj S-ro DAUCHEZ en valoro de 20 F. La tri gajnintoj skribu al la kasistino pri sia elekto: abono al gazeto, libro aŭ kreditkarto. Gratulojn al ili!

Per la jenaj proponoj de S-ro Bourgois komenciĝas la konkurso 1982, kiu promesas tri premiojn: 60 F, 40 F kaj 30 F. Ne timu partopreni, tio ja estas bonega lingvoekzercado.

- 1) être beau joueur; 2) il boit cela comme du petit lait; 3) faire bon ménage; 4) c' est de bonne guerre; 5) bosser comme un chef; 6) être chassé comme un malpropre; 7) elle a du chien; 8) ce n' est pas fait pour les chiens; 9) autant choisir entre la peste et le choléra; 10) ça coule de source.

+++++

PREGO POR LA TRIA AGO

O Maria, en la vespero de mia vivo, helpu min por danki la Di-Sinjorom pro Liaj donacoj al mi. Kun vi, mi kantas "Magnificat".

Donu al mi la certecon, ke ĉiuj miaj kulpoj estas pardonitaj, ke mia hodiaŭa sufero kaj la konstato de mia mizero estas riparaj rimedoj.

Donu al mi la amon, kompreneman kaj indulgan, por ĉiuj, kiuj vivas apud mi. .....



KONGRESO DE FKEA

NANCY 10/12-an de aprilo 1982

\*

LOK: Prez.: P. Degrelle; gesekr.: G-roj Greiner; kas.: S-ino Paradis.

KONGRESEJO: Cénacle de Prébois 1, rue de la Toulouse 54000 NANCY Tel:(83)98 11 89

ALIĜKOTIZOJ: individuo 25 F; geedza paro 40 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, ali-landano, sacerdoto, religiul(in)o, KELI-ano: senpage.

LIMDATO DE ALIĜO: 10-an de marto 1982.

\*\*

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton 10-an de aprilo: 10.00: akcepto, diskutrondo, kantezercado, libroservo  
14.00: spiritaj ekzercoj (paska preparado)  
prezento de la temo "Paska mistero"  
vespere: Paska Vigilio

Dimanĉon 11-an de aprilo: 7.30: sankta meso  
9.30: ĝenerala kunveno  
11.30: komitatkunveno speciala programo  
14.30: ekskursoj  
20.30: distra vespero por gejunuloj

Lundon 12-an de aprilo: vizito de vidindaĵoj

N.B. Eblas alveni vendredon 9-an de aprilo vespere.  
Nepre kunportu la KANTIKARON!!

=====

ALIĜILO (1)

sendota al S-ino Paradis 16, rue Pierre Curie 54110 DOMBASLE antaŭ la 10/3/82.

Mi aliĝas al la kongreso laŭ la ĉisupraj kondiĉoj kaj sendas la pagon per  
poŝtĉeko/bankĉeko (2) je la nomo de Paradis  
kotizo: (en kategorio ) .....F

S-ro/S-ino/F-ino (2) (nomo kaj voknomo)

adreso:

naskiĝdato (nur por infanoj)

Mi bezonas fervoja(j)n rabatilo(j)n

(1) Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu familiano; pliaj ekzempleroj haveblas ĉe la ĉisupra adreso.

(2) Forstreu la senutilaĵojn.

Mi petas la jenajn servojn:

vendredon sabaton dimanĉon lundon

vespermanĝon

tranoktadon + matenmanĝon

tagmanĝon

Mi proponas la jenajn servojn:

|                             |     |    |
|-----------------------------|-----|----|
| tenadon de la libroservo    | JES | NE |
| prizorgadon de la infanoj   | JES | NE |
| monkolektadon ĉe la diservo | JES | NE |
| legadon ĉe la diservo       | JES | NE |
| aliajn:                     |     |    |

DATO:

SUBSKRIBO:

KIEL ATINGI NANCY VAGONARE?

|            | (1)   | (2)   | (3)   |
|------------|-------|-------|-------|
| Paris-Est. | 8.54  | 12.50 | 13.17 |
| Nancy      | 12.15 | 15.38 | 16.16 |

(1) Ĉiutage; ebleco manĝeti en speciala vagono.

(2) nur vendrede; oficisto vendas manĝon.

(3) Ĉiutage; ebleco manĝi sur sia loko aŭ kiel (1)

|            | (4)   | (5)   | (6)   | (7)   |
|------------|-------|-------|-------|-------|
| Nancy      | 9.37  | 14.27 | 17.10 | 18.51 |
| Paris-Est. | 12.38 | 17.20 | 20.11 | 22.04 |

(4)(5)(6)(7) same kiel (1).

AGRABLAN KAJ FRUKTODONAN KONGRESON EN NANCY ! ! !

N.B. La restadprezoj aperos en la venonta bulteno.

Donu, ke mi konsentu kum la mondo tia, kia ĝi estas, kaj la tagoj, tiaj, kiaj ili estas.

Helpu min ankoraŭ labori laŭ la mezuro de miaj fortoj, esti servema, kaj, kiam ĉio ĉi estas neeble, almenaŭ donaci al aliaj rideton pro danko, indulgo, konfido kaj kuraĝigo.

O Maria, defendu min kontraŭ egoisma maljunaĝo, malgaja maljunaĝo, senespero...

Defendu min kontraŭ senutilaj bedaŭroj, malkvietaj rememoroj, angoroj kaj duboj.

O Maria, donu al mi la certecon, ke mia kompatinda vivo havas signifon.

Donu al mi tian neŝanceliĝan konfidon, ke la Di-Sinjoro atendas min, kiel la patro de la malŝparema filo por premi min inter siaj brakoj, kaj enigi min en sian senfinan ĝojon.

Sendis X. Dauchez.

+++++

### LA ĜOJAJ MISTEROJ

La Anun ciacim: Anĝelo Gabrielo  
Alflugas al Maria, salutas ŝin kun graco  
Kaj petas ŝin akcepti estadi por mondopaco  
Patrino de Jesuo sen rifuza ŝancelo.

"Kiu estas mi, Patro, por ke mia orelo  
Aŭdu tian vortadon? Ĉu jenas la prefaco  
Al zorgoj korotranĉaj? Venu, ĉielaŭdaco  
Por ke mi tuj respondu laŭ obee fidelo".

Ho fianĉo karega, tutcertas, ke sen via  
Ekhelpo mi fariĝos la patrino reĝdia.  
Servantino mi daŭras al vivoforto preta!

Ho Kristo, bebo mia, al vi mi volas gesti  
Kiel dolĉa panjo kaj vin ami, nutri, vesti"...  
Aŭskultu! Atendas vin kuzin! Elizabeta!

(25/12/80)

Maria nun vizitas sian kuzinon kun hast!  
Ŝia fil! renkontiĝas kun Elizabetido  
Kaj ŝi aŭdas parolojn, kiujn ŝi kun avido  
Enkorigas por l' alven! de la onta ĝojofast!

Gloro al Vi, Ho Savant!, ĉar mi restos sen bombast!  
Via panja servantin!. Al Vi, mia konfido  
En mia humileco kaj mia kredsolido,  
Ĉar sola Vi potencas kaj savas laŭ mondvasto.

Via boneco daŭras de jarcento al jarcent!  
Por la plenig! de l' malsat! en ĉiu terkontinent!...  
Ĉu aŭdiĝas jam kise la judasa mensogo?

Forkuras la riĉuloj kaj l' humiluloj ĝojas,  
Ĉar en la homa valo gracflueto ekrojas.  
Virgino, ĉu vi pretas al la lulila trogo?

(25/12/80)

Bebo ĵus naskiĝis en humila trogo. Gloro  
En la altoj al la Patra Di!. Al la homoj ĝoj!,  
Paco, viglo por eterna daŭro, ĉar la voj!  
De la vivosavo glatas. Krist!, al Vi, honoro.

Tutamonde ektondras la anĝela benfloro  
Anoncanta, ke nun kapablas starti la konvoj!  
De la sanktuloj senmeritaj, ĉar por tiu foj!  
En Mesio sin rivelas ja la gracfavoro.

Ekmarŝu la lamuloj, rigardu la blinduloj,  
Ne timu la pekuloj, viŝiĝas pekmakuloj:  
L' interliga arkeo trapasis la dezerton.

David! denove dancas kun la ŝafistoj nunaj,  
Maria kaj Jozefo dankemas kore kunaj,  
Eĉ se jam sin profilas la surmonta krucumo.

(26/12/80)

(daŭrigota)

KOTIZTABELO 1982

|                                               |      |
|-----------------------------------------------|------|
| IKUE kun "Espero Katolika" . . . . .          | 60 F |
| Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L. |      |

\* \* \*

|                                                         |       |
|---------------------------------------------------------|-------|
| ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . .       | 20 F  |
| Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj . . . . . | 10 F  |
| Bonfaranto . . . . .                                    | 100 F |
| Dumviva membro . . . . .                                | 400 F |

-----

|                                            |       |
|--------------------------------------------|-------|
| UFE kun "Revue Française" . . . . .        | 125 F |
| UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . | 135 F |

-----

|                                                                  |      |
|------------------------------------------------------------------|------|
| Abono al "Biblia Revuo" . . . . .                                | 36 F |
| Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N. |      |

+++++

Ĝ O J P L E N A N K R I S T N A S K O N K A J B E N A T A N J A R O N

al ĉiuj F.K.E.A.-anoj kaj al iliaj familioj!!!

Ni esperu, ke en 1982 nia asocio ankoraŭ pli vigle laboros kaj prosperos, kaj atingos sian 200-an membron!! (nun 178)

+++++

LA ADMINISTRA ANGULO

Jam de multaj jaroj, la FKEA-komitato enhavas la samajn kuragulojn, kiuj iam post iom ... maljuniĝas. Ili ja ne enposteniĝis dumvive, kaj tre dezirus, ke sin prezentu anstataŭantoj. Oni ne petos de ili grandan laboron, nur partoprenon en kunveno 3 foje jare (2 en Paris, 1 ĉe la kongreso).

Bonvolu (amase) anonci vin ĉe nia ĝenerala sekretario per la ĉisuba slipo

+++++

KOMITATO

slipo sendota al S-ro R. Despiney 43, quai de Champagne 94170 Le Perreux/Marne

- Nomo kaj voknomo:
- Adreso:
- Naskiĝdato:
- Profesio:

Mi kandidatiĝas ĉe la komitato de FKEA.

Dato kaj subskribo:

+++++

|                                  |                                          |
|----------------------------------|------------------------------------------|
| Dépôt légal: décembre 1981       | !! Polycopié par F. M. C.                |
| C. P. P. n° 62 532               | !! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie |
| Directeur-gérant: Roger Despiney | !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE        |